



HOMOJ NI ESTAS
KAJ NENIGHOMA
ESTAS AL NI FREMO
TRA LA MONDO IRAS FORTA VOKO
PER FLUGILOJ DE FACILA VENTO..
EN LA MONDON VENIS NOVA SENTO

Kulturaj Kajeroj

E. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, EPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

JARABONO :

Sendotaj al : Micard Henri
Kulturaj kajeroj
Simpla : 5 fkoj /
Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)
C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pagó 4)

MAJO - JUNIO

1963

3

KULTURAJ KAJEROJ

1963

Majo - Junio

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

ENHAVO

Kial ? (P. Babin).

Esperanto tra la Mondo

El ie en la mondo

Samarkand (II) (P. Poliščuk).

Esperanto-Koboldo (F. Szilagi).

Kelkajn minutojn kun J.L. Mahé.

Turismo arkeologia.

Oppidum'o Enserune (II) (J. Salasc).

El Nederlando

Reĝino Wilhelmina mortis (M. de Waard).

Por via distro

Nia Konkurso.

Bonhumoro

La represo de artikolo el nia revuo estas
pomenata post interkonsento kun la redakcio.
Ni ĉiam citi la nomon « Kulturaj Ka-
jeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ
gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzajojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

KIAL ?

En « Le Courrier » de Unesko antaŭ unu monato aperis artikolo de iu Sro Robert H.J. van Kuyk kiu asertas, ke li estas « estinta esperantisto », kaj kritikas la internacian lingvon dirante ke ĝi estas artfara lingvo, sen kultura fundamento, ne taŭga por ĝenerala uzo, ktp. Mi ne intencas respondi tiujn asertojn pro tio ke multaj ĝesamideanoj tion faris rekte al « Le Courrier », kaj Prof. Lapenna majstre respondis en la lasta numero de « Esperanto ». Sed tiu artikolo pensigis min. Vi scias ke unu el la multaj mankoj de intelektuloj estas neniam kontentiĝi per la aspekto aŭ rezulto sed ĉiam serĉi la kialon. Kial, jes kial « estinta esperantisto », tiamaniere, tiel erare kritikis Esperanton.

Frapa estas la fakto, ke Sro van Huyk kvankam « estinta esperantisto » ne konas Esperanton! Eble li lernis Esperanton, eble li povis skribi leteron sen-eraron, eble eĉ li ne forĝis la akuzativon kaj obeis la regulon pri ita-ata. Eble li scipovis la lingvon sed certe li ne konis ĝin. Ĉu vi konas viron nur pro tio, ke vi scias ke li estas blondhara, bluokula, altstatura kaj eleganta? Oni ĉiam diras ke estas necese vivi kun homo por lin aŭ ŝin bone koni. Versajne nia « estinta esperanto » ne havis okazon partopreni en la vivo de Esperanto. Li ne vivis « per Esperanto ». Li ne praktikis la lingvon tiagrade, ke li sentis ĝin sia. Li ne troviĝis en medio internacia sed ne diversacia pro tio, ke ĉiu forĝas sian propran nacieron (ne sian landon!). Li certe neniam sentis tiun « artefaritan lingvon » sia « natura esprimilo ».

Sed kial? En kiuj cirkonstancoj? Sro van Huyk lernis Esperanton? Kial lernis Esperanton tiuj kelkaj kontraŭuloj « estintaj esperantistoj » kiuj de tempo al tempo bezonas diskonigi sian malsukceson?

Ĉar fakte temas pri malsukceso ilia, ĉu pro malbona lernado, ĉu pro maltrafa praktikado kaj utiligado de la lingvo.

Kiam oni ne sufiĉe bone lernis la lingvon oni neniam sentas ĝin « sia » lingvo. Sed « bone lernis » ne signifas « ellernis ». La taŭga lingvonivelo dependas de la bezonoj de la lerninto, kaj studo-malsukceso ne signifas nesufiĉa studado, sed pli malpli grande diferenco inter la lingvo kaj la lingvo-bezono. La lingvo-bezono (ankaŭ nacia lingvo) de tiu, kiu deziras nur interkomunikigi kun najbaroj, kamaradoj, estroj, vendistoj, legi gazetojn, skribi leterojn de tempo al tempo, ne estas tiom granda, tiom altnivela kiom la lingvo-bezono de la homo, kiu ŝatas lerni per legado de sufiĉe malfacilaj libroj, per aŭskultado de prelegoj, per diskutado.

Ambaŭ homoj estas bonaj esperantistoj se ilia lingvo-trezoro sufiĉas por ilia kutima uzado, kvankam ili ne estas same bonaj esperantlingvanoj.

Pri la lerta esperantlingvano prezentigas alia problemoj: la okazoj utiliigi sian lingvan lertecon. Se li deziras nur kulturiĝi per libroj, prelegoj, diskutoj, interhomaj kontaktoj, li certe ne farigos « estinta esperantisto », pro tio ke la okazoj kulturiĝi per esperanto ne mankas. Sed se li volis, lernante Esperanton, utiliigi la internacian lingvon en sia profesio, se li imagis, ke Esperanto alportos al li alian riĉecon ol la koran kaj kulturan li certe seniluziĝos ĉar Esperanto ankoraŭ ne sufiĉe eniris la profesiajn mediojn, kiel profesia lingvo.

Pri la malpli lerta esperantlingvano (sed ne malpli bona esperantisto!) la problemoj estas malsama: li devas atingi lingvo-nivelon sufiĉan por siaj ordinarnaj bezonoj. Sed se li ne deziras iri pluen li haltu sian teoriaran studadon; oni ne uzas traktoron por plugi ĝardeneton! Ilo kiu superas la bezonon aŭ la celon estas tro malfacile direktebla. Ankaŭ Esperanto estas mirinda kulturiĝilo... por tiuj, kiuj deziras kulturiĝi. La homo kiu estas intelektale meznivela, ne « tro » lernu Esperanton, ne pli ol sian nacian lingvon, ĉar liaj intelektaj bezonoj ne estos pli grandaj, kiam li estos lerninta Esperanton: ili estos nur diferencaj. Se oni lernigas al li la gramatikon tro profunde, li malkuraĝigos ĉar li konstatos, ke Esperanto estas tro malsimpla por li.

Konklude mi opinias, ke la gvidantoj devas atenti pri la fakto, ke serioze lernos Esperanton nur tiuj kiuj ĝin bezonas: oni ne plu havas la tempon lerni ion nur por la plezuro lerni. Tiu bezono estas ne nur tre diversa sed ankaŭ tre diversnivela. Al ĉiu bezono oni adaptas la ilon. Kaj la laboro de niaj propagandistoj estas krei aŭ eligi la bezonon kaj diskonigi la ilon.

P. BABIN.



« KULTURAJ KAJEROJ »

regule atingos vin
se vi
tuj reabonas

Esperanto tra la Mondo



Plenaeraj libertempoj

— Ĉu vi konas la « Muelejoj de la Metiler-
nantoj » en la franca departemento Creuse ?
Tiu organizo por fratigo de la ĉiulandaj gejunuloj
alvokas la esperantistojn por partopreni la liber-
tempajn somerajn restadojn. Jam ekzistas « Pa-
vilono (ligna domo) de esperanto » ! (en Ché-
niers, Creuse). Sendu 2 internaciajn repondku-
ponojn aŭ 1 franca franko al : « Moulin des ap-
prentis » Bonnat (Creuse), Francio, kaj vi ri-
cevos belan faldfolion esperantlingvan. Vi povas
ankaŭ rilati kun G. Perra, 145, avenue Lacassa-
gne, Lyon (3^e), se vi estas volontulo por helpi
en la konstrua laboro de la asociojn.

— La urba kampadejo « Dro Zamenhof »,
en Vallon-Pont-d'Arc (Ardèche) estas nun unu
el la rendevuejoj de la esperantistoj. Ĉi geme-
ligis kun la esperanta libertempa vilaĝo de Pri-
mošten, ĉe la marbordo, en Jugoslavio. Pri Val-
lon-Pont-d'Arc informos vin : « Vivara Stelo »,
Quartier de Baza, Aubenas (Ardèche).

— Por la gejunuloj : esperanto-kampado
en la fama banloko Grönitz, en Germanujo (27a
julio-11a aŭgusto). Informoj : Hamburga Esperan-
to-Junular-Klubo, Burgwedel, 6, Hamburg-
Schnelsen.

— Dum aŭgusto, Studenta esperanto-klu-
bo en Zagreb (p.f. 213) organizos semajnon por
studentoj en la kampadejo de Primošten, kun
ekskurtoj.

Ankaŭ por viaj libertempoj

— Esperantista Turisma Servo estis kreita
en Zakopane, la ĉefurbo de la pola montaro
Tatroj. Skribu al Filio de Pola Esperanta Asocio,
Zakopane, ul. Koscieliska 42, Pollando.

— La XXIVa Nacia Hispana Kongreso de
esperanto okazos en Barcelono (25-28a de ju-
lio). La LKK preparas allogan programon : oni
esperas la partoprenon de multaj eksterlandaj
gastoj.

Novaj libroj

— « Stafeto » ĵus eldonis dikan romanon
de Raymond Schwartz (488 paĝajn) : « Kiel
akvo de la Rivero ».

— Sama eldonisto publikigis : « Zamen-
hof, aŭtoro de esperanto », de Marjorie Boulton.
— « Amo-Akademio », en Japanujo, eldo-
nis « Ĉekaj fabeloj ».

— En Japanujo ankaŭ, en la UEA serio
« Okcidento-Oriento », aperis « Rokontoj de
Oogai » de Mori Oogai.

— Nova libro el Skandinavio : « Sipestro
rakontas » memoraĵoj de la marista kapitano
Lundquist.

Inaŭguro en U.E.A.

— En la sidejo de U.E.A., en Roterdamo,
oni inaŭguris la 10 ĉambrojn jam pagitan kaj
instalitajn dank'al la malavareco de pluraj sami-
deanoj aŭ naciaj asocioj.

La biblioteko « Hector Hodler » kiu ente-
nas proksimume 10.000 esperantlingvajn librojn
estas nun ankaŭ instalita en la sidejo.

Esperanto kaj la blinduloj

— Lastan jaron, en Hannover, okazis inter-
nacia konferenco de edukistoj de la blinda junu-
laro (400 delegitoj de 43 landoj). Rezolucio de
Ligo Internacia de blindaj esperantistoj, favore
al instruado de la internacia lingvo, estis akcep-
tita.

Universala kongreso de Sofia

Atentu ! la limdato por aliĝi estas la 30a
de junio Tre certe, pli ol 2500 personoj ĉeestos.
Estas fervojaj rabatoj en Bulgario, Hungario, Svis-
lando kaj Aŭstrujo por la kongresantaj grupoj.

Stratoj kaj placoj

Oni anoncis lastempe, straton « Zamen-
hof » en Montélimar (Francujo), straton « Espe-
ranto » en Porto-Empedocle (Sicilio). Zamenhof-
monumentoj prepariĝas en Lintz (Aŭstrio) kaj
Utrecht (Nederlando).

Por la teknikistoj kaj sciencistoj

— Ĉe bulgara Unuiĝo de sciencaj laboris-
toj, fondiĝis esperanto-sekcio kun 60 membroj,
i.a. estas pluraj anoj de la bulgara Akademio de
Sciencoj.

— Inĝenieraj kaj teknika fakrondoj fondiĝis
en Budapeŝto. Ambaŭ sekcioj celas traduki scien-
cajn traktadojn kaj kontakti similajn grupojn
ekstere.

En la lernejoj

Esperanton instruas nun 26 lernejoj (pa-
sintjare : 20) en Britujo, al entute 1250 gekna-
boj.

Internacia kurso

— Internacia kurso de esperanto okazis
lastempe en Zagreb. Partoprenis 80 studentoj
el 14 landoj de Azio, Afriko, Sud-Ameriko. La
unuan lecionon venis filmi la jugoslava televido.

El ie en la mondo

Samarkand

(II)

En la jaro 712, la armeoj de arabaj-konkerintoj sub la gvidado de Kutejba, rompis la reziston de la loĝantaro kaj invadis la urbon. Post unu jaro, en la urbo okazis granda ribelo de la loĝantaro, kiun post la ĉesigo de la ribelo, oni elpelis el la urbo, kaj oni loĝigis en la urbon, arabojn. La araboj, ne nur konkeris la urbon, sed ankaŭ per sango kaj glavo, altrudis al la loĝantaro, muzulmanan religion, ĉar ĝis la alveno de arabaj konkerintoj, la loĝantaro de Samarkand estis pagana.

Post la disfalo de araba kalifato (ĉe la komenco de IX-a jarcento), la regado en la lando transiris al la dinastioj de lokaj regantoj — la idoj de Tahir kaj iom pli poste, al la idoj de la duko Ismail Samani — al Samanidoj (IX-Xa jarcentoj). Dum la regado de Samanidoj, denove komenciĝis la disfloro de la urbo. La urbo komencis kreski, vastiĝi sude, tamen, iom post iom, okupante pli grandan teron, elirante el la teritorio de Afrosiab. Jam en la X-a jarcento, la plej loĝata parto de la urbo estis ne Afrosiab, sed la parto situanta pli sude de ĝi, en la loko, kie nun estas situanta la « malnova urbo ». Komenciĝis denove la produktado de argila kaj vitra manĝilaro, papero, silkaj kaj kotonaj teksaĵoj, ktp. Unu nekonata aŭtoro skribis : « Samarkand estas granda urbo, prosperanta kaj bone ordigita, ĝi estas la loko, kie kunvenas komercistoj de la tuta mondo ».

Pri la riĉa vivo de Afrosiab, en la 12-13aj jarcentoj, atestas diversa, multenombra arkeologia materialo : vitraĵoj, metalaj artaĵoj, ceramiko, brikaĵ arkitekturaj ornamaĵoj, ktp. Tiam Samarkanda regiono estis la plej fruktodona kaj riĉa en la baseno de la rivero Zareŝan.

Dum la XI kaj XII-aj jarcentoj, Samarkand kelkfoje transiris de unu konkerinto al la alia. Komence ĝin regis turkaj-karahanidoj, kiuj forprenis la urbon de samanidoj, fine de la X-a jarcento. Poste la urbon regis selĝukaj sultanoj, karaĉinoj kaj hanoj de Horezmo (Hiva).

En la jaro 1219, sur la teron de Meza Azio, venis la hordoj de Mongoloj, sub la gvidado de Ĝingiz-Han. En marto 1220-a, la hordoj de Ĝingiz-Han, malgraŭ la firma rezistado de samarkandanoj, eniris la urbon kaj preskaŭ plene ruinigis ĝin kaj neniligis ĉiujn virojn, krom metistoj, kiuj estis sklavigitaj. Sklavigitaj estis ankaŭ la virinoj kaj infanoj.


Sed denove la urbo reviviĝas, kaj vizitinta la urbon, en la dua duono de XIII-a jarcento, venicia-

no Marko Polo, atestis, ke « la urbo Sanmar estas tre granda kaj bona urbo ».

Dum la regado de mongoloj, ĝis la dua duono de la XIV-a jarcento, estis kreata vico da arkitekturaj monumentoj, kiuj sufiĉe bone konserviĝis, kaj pri kiuj mi rakontos al vi iom pli poste.

La plej grandan disfloron havis Samarkand dum la regado de Timur (1370-1405). Lia regado estis la periodo de preskaŭ seninterrompaj militiroj, kaj rezulte, li kreis kolosan imperion. La ĉefurbo de tiu monda imperio de Timur fariĝis Samarkand, kiu dum la tuta tempo de mongola periodo estis sen muroj. En la jaroj 1371-1372, laŭ la ordono de Timur, estis restarigitaj la ruinigitaj antikvaj urbaj muroj. En la okcidenta parto de la urbo estis konstruata citadelo. La tuta regado de Timur estas karakterizita per grandega konstruagado. Estis plibonigata la urbo mem kaj la bazaro en ĝi. Estis konstruataj novaj grandegaj konstruaĵoj. En la ĉirkaŭaĵoj de la urbo aperis novaj loĝlokoj, havantaj nomojn de ĉiuj ĉefurboj de musulmana mondo. Estis plantataj ĝardenoj kaj konstruataj palacoj, moskeoj, medreseoj, ktp.

Timur interŝanĝis ambasadorojn kaj leterojn kun multaj landoj (Genovo, Venecio, Turkio, Bizanco,



La detalo el la ornamo de unu el Maŭzoleoj en Sahi-Zinda — Majstro Ali Nesefi.

Hispanio, Francio, Anglio). En la jaro 1404 el Hispanio venis al la kortego de Timur, delegitaro, sub la gvidado de Rui Gonzales de Klaviho, kiu kompi- lis interesan priskribon de sia vojaĝo en la formo de taglibro.

Karl Marks, en siaj « Kronologiaj Notoj », parolante pri Timur, substrekis lian profunde kontraŭdireman figuron : « Li donis al sia nova regno ŝtatan ordon kaj leĝojn, kiuj faras grandan kontras-


ton kun tiuj bestecaj agoj kaj sovaĝaj ruinigoj, kiujn laŭ liaj ordonoj faradis tataraj hordoj ».

Al la epoko de Timur rilatas kelkaj konstruaĵoj, kiuj konserviĝis ĝis nia tempo en Samarkand : la moskeo, konata sub la nomo « Bibi-Hanim », la maŭzoleo « Gur-Emir » kaj vico da maŭzoleoj en la tombejo « Sah-I-Zinda ».

En Februaro 1405, dum la preparado de la grandioza, laŭ la projekto, militiro en Cinion, Timur mortis. La regado, post iom da tempo, transiris al la malpliaga filo de Timur-Sahruh, kiu forlasis Sa-

cipe kun Cinio. Kun la nomo Ulugbek, estas ligita en Samarkand, la vico de konstruaĵoj, el kiuj ĝis nia tempo, konserviĝis la medreseo en la placo de Registan kaj la restaĵoj de lia astronomia observatorio. Dum lia regado estis finkonstruita la maŭzoleo « Gur-Emir ».

En la fino de la XV-a jarcento, Samarkandon ekposedis, por ne longa tempo, la timurido Zahirreddin Babur, la aŭtoro de famaj memoraĵoj, en kiu sufiĉe detale estas priskribita tiutempa Samarkand. Babur skribis : « Samarkand estas mirinde belega



La enirejo kaj du Maŭzoleoj de antikva tombejo Sahi-Zinda

markandon kaj faris Gerat (en la nuntempa Afganistan) sia ĉefurbo. La regionojn inter la riveroj Syr-Darja kaj Amu-Darja, kun la centra urbo Samarkand, Sahruh transdonis al sia plej aĝa filo Ulugbek (1409-1449).

Post la morto de Timur, estis sentata la tendenco al la disfalo kaj malplifortigo de timurida regno. Tamen Samarkand en la unua duono de la XV-a jarcento, restis la centro de samarkandaj timuridoj, konservante la trajtojn de ĉefurbo. Dum la regado de Ulugbek, oni daŭrigis la konstruadon de diversaj publikaj kaj privataj konstruaĵoj, estis subtenataj viglaj interrilatoj kun aliaj landoj, pre-

urbo. Ĝi havas unu originalecon, kiun oni povas renkonti en ne multaj urboj : ĉiu speco de komerco kaj produktado estas efektivigata en la apartaj lokoj de la bazaro kaj urbo, sed ne miksite. Tio estas bonega kutimo. Ĉi-tie estas bonaj panbakejoj kaj manĝejoj. La plej bona papero en la mondo estas produktata en Samarkand. Ankoraŭ unu produktado de Samarkand : la skarлата veluro, kiu estas eksportata en ĉiujn landojn... Samarkand grandkvante produktas bonegajn, diversajn fruktojn : Vinberojn, melonojn, pomojn, granatojn ; bonegaj estas ankaŭ la aliaj fruktoj. Precipe estas famaj la samarkadaj pomoj kaj « sahbi » (speco de vinbero). »

P. POLISCUK (daŭrigota).

La redaktoro de « Norda Prismo » skribis por vi :

ESPERANTO - KOBOLDO (II)

La dua kaj la tria koboldaj historioj ligiĝas al vojaĝo al Vieno kaj reen per Danuba ŝipo. Mi volas ĉifoje preterlasi la turisman reklamon pri la du belaj metropoloj, Budapeŝto kaj Vieno kaj kvankam estus agrable priskribi la ripozigan veturadon per la ŝipo, mi nun konstati nur, ke la vojaĝo al Vieno estis iom tro ripoziga, ĉar ĉirkaŭ la vespero ni venis en nebulon, (estis en julio en la mezo de la tridekaj jaroj). La ŝipo senmove kuŝis sur la ondoj dum preskaŭ ses horoj. Mi ripozis en t.n. ripozoseĝo kaj ekdormis, havis verŝajne belajn sonĝojn, ĉar kiam mi vekigis, ni jam estis proksime al la limo, la nebulo malaperis kaj en la plena elektra lumo de la ŝipo tuj apud mi staris ĉarma blondulino, ĉu ĝermana tipo aŭ slava, mi jam ne memoras. Malfermintemianj okulojn, la unua, kion mi rimarkis en ŝiaj manoj, estis Heroldo de Esperanto, kiun ŝi atente esploradis. Mi kredis, ke temas pri la daŭrigo de mia sonĝo :

— Bonan vesperon ! Ĉu vi estas esperantistino ?

— Ne, ne, ne, ne — sonis la ĝermana respondo, dum kiam la fraŭlino tre bele rugigis. Ŝi klarigis iom malfacile ĝermane, ke ŝia fianĉo estas esperantisto kaj ŝi ricevis la gazeton por konvinkiĝi, ke ŝi povus lerni Esperanton ; ŝi ja studis en la lernejo ankaŭ la francan.

Kial trolongigi tiun ĉi epizodon. Mi provadis kvar lingvojn sinseke ĝis ni komprenis, ke denove la Koboldo petoladis kaj ŝi estis hungarino kaj ni parolis dum pli ol unu horon lingvojn, kiujn aŭ ŝi aŭ mi ne regis sufiĉe. Sed la ŝipo estis tro internacia...

La tria rakonto estas tute alispeca. Mi

revenis per la sama ŝipo el Vieno, kie mi aranĝis interkonsentojn kun kortega konsilisto Steiner. (Tio signifis ke ni batalis leonece ĉiu por sia « verda » ĉefurbo. Iam niaj landoj estis en la sama ŝtatfederacio kaj tiam oni terure opoziciis kontraŭ la alia ; post la unua mondmilito, sendependaj (?), ni nur rivalis, sed kiel bonaj esperantistoj ni akiris ekstreme la diskutojn, se temis pri pacaj, turismaj problemoj, eble nur por pruvi ke oni bone povus malpaciĝi per Esperanto. Sed tuj post la disiĝo ni estimis simpatie unu la alian).

Al Budapeŝto tiam veturis amaso da eks-terlandanoj. Mi volas konsideri la spacon de la gazeto kaj preterlasante la ravegajn vesperajn vidaĵojn sur la Danubo, (faru tiun vojaĝon, se vi volas havi plezuron), mi mencias nur, ke duonhoron antaŭ la alveno, hungara konato alparolis min :

— Vi estas esperantisto. Certe vi konas iun bonan, ne multekostan hotelon en Budapeŝto. Tie estas ĝermana paro, ili volus havi ĉambron.

— Ĉu ili estas esperantistoj ?

— Certe ne !

— Domaĝe. En Hotelo Kontinental (mi devis poste iri tien, ĉar ni havis nion kunvenojn tie) esperantistoj ricevas altan rabaton.

— Se mi iras tien, ĉu estas skribite sur mia nazo ke mi estas aŭ ne estas esperantisto ?

— Ne, sed vi parolas Esperanton. Io alia ne estas necesa. Ankaŭ la hotelpordisto parolas ĝin. Eĉ la direktoro. Ankaŭ la gastoj.

Kvankam inter tiuj estas kompletaj komecantoj.

Mia amiko forvaporigis.

Estis bela vespero, mi ne havis valizojn, mi do promenis al Hotelo Kontinental, al la kunveno.

La hotelpordisto haltigis min :

— Ĝus alvenis kelkaj esperantistoj. Ĉu vi volus paroli kun ili ?

La liftisto diris :

— Ili estas en la lifto. Baldaŭ ili estos jam en la tria etaĝo.

— Revenigu ilin, diris la pordisto.

Oni revenigis la lifton. En ĝi staris ĉirkaŭ 60-jara, ruĝvizaĝa maljuna germano kaj tute simila edzino.

— Bonan vesperon gesamideanoj bon-

venon al Budapeŝto kiel vi fartas ?

Silento. Mi provis nur kun 15 kilometra rapideco la saman alvensaluton. Silento. La paro iĝis tiel ruĝa kiel matura tomato. Strange.


— Ĉu vi ne estas esperantistoj ? mi ĉemandis germane.

La maljuna sinjoro respondis (germane) :

— Ne, sinjoro. Ni tute ne estas esperantistoj, eble ni estos. Sed iu sur la ŝipo al Budapeŝto diris al ni, ke oni donos al ni al-tan rabaton en tiu hotelo, se ni diros, ke ni estas esperantistoj...

Mi dubas, ke ili iam lernis Esperanton. Sed pri la rikano de la Koboldo pro la bon-sukcesa ŝerco mi tute ne dubas.

F. Szilagyi.



AUSKULTU LA RADIO-ELSENDOJ EN ESPERANTO

Petu informojn de :

Sro G. Larglantier

29, Boulevard Murat

Paris (16^e)

Francujo

KELKAJN

MINUTOJN

KUN . . .

J.-L. Mahé



JANA RAVSELJ
en « Angoroj »

— Ĉu temas pri filmo pri esperanto aŭ nur filmo esperantlingva ?

Ĉi ne estos ekzakte propagandfilmo, laŭ la ĝenerala signifo de tiu esprimo. Neniam eĉ, oni elaŭdos la vorton « esperanto ». Tamen, mi multon esperas el ĝia varbemo, pro tio, ke mi volis fari demonstracion pri la vivanteco kaj parolebleco de nia lingvo. Alivorte, ni diru ke ĝi estos, se ne perfida, almenaŭ maskvestita propagandilo.

— Kiu estas la titolo ? Kaj la temo ?

La titolo ? « ANGOROJ ». La temo ? Mal-lumega « grandĝinola » dramo.

— Kiu verkis la parolojn ? kiu ĝin interpretas ?

La dialogoj estas miaj. Ili estas eseo bazita sur slanga lingvaĵo.

Mi neniam sufiĉe omaĝos miajn interpretantojn. En drameca temo, oni senĉese promenas sur la limo de ridindeco se la kreantoj ne

« Kiu ? J.-L. Mahé ? Mi konas tiun nomon. Jes... Mi nun memoras. Ĉu ne li desegnis la kovripaĝon de Kulturaj Kajeroj ? — « Ne li, sed lia fratio ». « Sed kion li faris ? » — « Ĉu vi ne memoras, Grezijonanoj, tiun mezgrandan brunulon, kiu plurfoje vizitis la Kulturdomon, kiu kun kamero ĉemane, « persekutis » vin en la kursĉambron, la salonon, la manĝoĉambron, la dormoĉambron, la koridorojn, la parkon, ktp... Tiutempe li preparis filmon pri la kastelo, kiun vi havis la okazon vidi en Grésillon ». — « Jes Mi meroras lin kaj ankaŭ lian filmon, kiu havis grandan sukceson ». — « Antaŭ multaj jaroj li li jam faris alian, senparolan, filmon. Tute sekrete mi diras al vi, ke li faras filmon esperantlingvan ». — « Kio eksterordinara ? Aliaj tion faris jam ». — « Jes. Sed certe ne similajn filmojn. Venu kun mi lin viziti. Li mem klarigos la aferon ».

— Kara Mahé, kial vi intencis fari tian filmon ? Kia estas via celo ?

Tre simple ĉar tiu deziro tiklis min jam de multaj jaroj. Mia celo ? Starigi la unuan (laŭ mia scio) filmon originale verkitan, luditan, enregistritan rekte en esperanto, per esperantlingvaj aktoroj.

estas perfektaj. Nu, Jana Raŭselj majstre ludis sian malfacilan rolon, kaj sub la aktora gvidado de Serge Flego, kiu tiel funde konas kaj scias ekspluati ŝiajn kapablojn, ŝi trafis momentojn de premeza tragedio.

Siaflanke, Flego mem, en persono de Karlito, vivigis movplanan kaj paroleman ekzemplon de suburba faŭno. Se la interpretado de « Angoroj » devas esti sukceso, ĝi ŝuldas multon al la kontribuado de la Internacia Teatro, pere de la paro Jana-Flego.

Alia estas la kazo de Darnault (de la Franca Radio Kaj Televido). Tiuj, kiuj konas la fajnecon kaj la elegantan nuancecon de Marc Darnault, malfacile imagos kiel li povis aspekti sub la trajtoj de piedskala sovaĝa murdisto. Mi mem ne precize antaŭvidis la rezulton, kaj granda estis mia feliĉo antaŭ la stranga tipo de kolerema bandito, kiun nia amiko kreis per la plej metilena talento.

Multajn kaj varmajn dankojn mi ŝuldas, sur alia tereno, al mia amiko Jean Thierry. Krom la aktoroj, li sola konsciis ek de la unuaj tagoj pri la seriozece de la projekto, kiam mi sensukcese penis starigi helpantaron. Li senpare dediĉis sian tempon al la filmo, kaj partoprenis (as) ĉiujn laborojn senlace. Mi sincere kredas ke, sen li, sola konstanta kunlaboranto, la afero estus restinta en dosieroj.

— Ĉu vi renkontis materiajn malfacilaĵojn ?

Jes, unu tre grava, kiu ege prokrastis la komencon de la laboro. Dum pli ol ses monatoj, mi provis fari antaŭstudon de la merkato, por juĝi ĉu tia afero estas amortizebla, kaj ĉu la rimedoj de la esperantistaj medioj permesus tion efektiviĝi. Ne nur mi povis ricevi kvazaŭnenian validan informon, sed mi eĉ ne trovis manieron ilin veki. Ĉiuj klopodoj tiaj restis vanaj. Fine, nia Micard desegnis al mi la kondutlinion : « Oni nenion respondos al vi pri projekto. Prezentu realaĵojn. La similo okazis al mi

kiam mi volis starigi Grezilion-on. Fine, mi ĵetis min en la akvon. Faru la samon » Kaj ankaŭ mi ĵetis min en la akvon.

Aliaj malfacilaĵoj mi renkontis, sur tute alia tereno. Por iu sceno, mi tre bezonis maljunulon blankbarban, kaj mi absolute ne trovis tion ; ŝajnas, ke la raso de esperantistaj blankbarbuloj estingiĝis kun la milito. Nur junaj viroj havas nun barbon. Fine, mi devis ŝminki junan aktoron.

— Mi supozas, ke vi esperas reenspezi la elspezitajn sumojn. Kiamaniere ?

Vi prave supozas. Kiamaniere ? Nu, vendonte kopiojn de la filmo al sufiĉe da klientoj por amortizi la elspezojn. Ĉu tiuj klientoj estos sufiĉe multaj, ĉu ilia pagokapablo estos sufiĉe granda ? Jen la grava demandpunkto. Pri tio, mi havas nenian ideon, kaj la risko estas... angora.

— Se via filmo renkontos sufiĉe grandan sukceson, ĉu vi faros alian filmon ? Ĉu vi jam havas ideon pri la temo ?

Se ni ne volas intermiksi la tibiojn, ni faru paŝon post paŝo. Nun, ni komencas la unuan. Gravas, ke ĝin ni finu. Poste, ke ĝin ni prezentu. Postposte, ke ni atendu la rezultojn. Postpostposte, kaj tiam nur, ni povos paroli pri eventuala sekvo.

— Kiu, laŭ vi, estas la graveco de tia realigo por Esperanto ?

Mi tro dronas en la afero, jam de ses monatoj, por kapabli taksu ĝin malvarme. Ŝajnas, ke ĝi devus esti ŝtupo en la movado.

Ni kompreneble, kore gratulas J.-L. Mahé kaj liajn helpantojn. Ni deziras al ilia filmo plenan sukceson, ĉar ankaŭ ni estas certaj, ke Esperanto havu sian lokon en ĉiuj aktivajoj de la moderna vivo.

TURISMO ARKEOLOGIA

Oppidum'o de Enserune... fosaĵoj kaj Muzeo

(2-a parto)

De tiam, Enserune romiigas. Riĉaj domoj ekstaras ĉirkaŭ vasta cisterno kun fres-dekoraciitaj muroj, metiejoj por tanindustrio, por tinkurado per fulado aŭ forĝado.

Bedaŭrinde, la ĝenerala plano de tiuj domoj povas malofte esti restarigita. La kultivadoj dum 2000 jaroj tute malordigis la postrestaĵojn de tiu lasta grundo kaj nur restas la profundaj partoj : cisternoj, laborejoj en kiuj oni retrovas la farbitajn stuojn de la riĉa domo surstarinta.

Fine Enserune perdas sian loĝantaron. Tion rezultigas la Roma paco « Pax Romana ». Tro malproksimaj de siaj kampoj kaj preĉipe de la akvofontoj la loĝantoj forlasis la monteton kaj iras fondi tra la ebenejo tiujn riĉajn kampobienojn, el kiuj formigos la kerno de niaj nuntempaj vilaĝoj.

La metodaj prifosadoj de tiu riĉa Oppidum'o ebligis kolekti gravegan arkeologian materialon kiu estas kunmetita en la haloj de la Muzeo.

La vizito de tiuj kolektoj kompletigas kaj lumigas tiel feliĉe en Enserune la ruinojn, kiuj ekaperas ĉirkaŭe kaj eĉ en la subteretaĵoj de la ampleksa kaj gracia konstruaĵo planita de la ĉefarkitekto de la Historiaj Monumentoj, Sro Formige...

La enirhalo estas meblita per muelŝtonoj el laŭo aŭ el granito, kies tipo transpasas de la ir-reirmovado al la rotacisistemo uzita komence de la IIIa jc.

Meze, starigas grava « dolium'o » (3), kies supro, kiu elstaras el la antikva planko kiel putrando, estas dekoraciita per la duobla sorĉsignifa voluto. La amforoj, kiuj viciĝas ĉirkaŭe komprenigas jam al ni la komercajn interŝanĝojn, kiuj interrilatigis En-

serune'on kun la mediteraneaj popoloj. Fakte, ili (la amforoj) estas masaliotaj (4), iberaĵ, italiotaj (5), aŭ rhodiaj (6) kaj eble elŝipiĝis eĉ la tutproksima Vendres-haveno. Kelkaj estis reutiligitaj kiel filtriloj per aper-turo taŭgaranĝita en ilia ventro.

En la ĉambro, post tiu vestiblo, estas kunigita la rezultaĵoj de la elfosadoj efek-



tivigitaj eĉ la nekropolo ekde 1945. Tie, eble pli ol alie, oni konstatas la kosmopolitecon de nia urbo. Fakte, se komuna rito kunigas ĉiujn tiujn tombojn : la cindrigo, ĉi tiuj diferencas per la diverseco de la ceramiko, kiuj ŝirmis la kompatindajn homrestaĵojn. Tiuj ostarejoj prezentigas sub la formo, ĉu de eleganta kratero plej ofte ornamita, devena de Grekujo, ĉu de anspokalo kun ovformaj ornamoj, kampania aŭ apulia, ĉu de vazo el helargilo kaj modere dekoraciita, nomita ibera, ĉu fine de malhela kaj

ventra cindrouro kunportata de celta komercisto. Tie kuŝas 130 tomboj aparte prezentitaj kun ties meblaro (hejmvazoj, ofer-versaj pokaloj, armiloj, juveloj, ludiloj, restaĵoj de funebraj manĝoj) kiu ebligas sufiĉe facile restarigi, ankaŭ dank'al la fotografado dum la prifosado, la detalon kaj la interrilaton de la funebra rito.

La etaĝaj ĉambregoj de la Muzeo estas nomitaj; ĉambrego Mouret kaj ĉambrego Sigal. Tiuj du nomoj rememorigas la historion de la prifosado kaj la arkeologiajn laborojn ekde la unuaj traserĉoj ĝis la jaro 1945.

Fakte, Sro Mouret, la unua, atentigis la tiumondajn scienculojn pri Enserune, ĝia nekropolo kaj ĝiaj siloj kaj kunigi, en la daŭro de kelkaj jaroj, la plej gravan ceramikan tutaĵon el grekaj importataj vazoj, la plej diversan kolekton de celtaj juveloj ĝis tiam trovitaj. La fama pokalo « Procris kaj Cephale » mem sufiĉus famigi arkeologian lokon.

En la sekventa ĉambrego Sigal, ni trovas vicon da vitroŝrankoj, kiuj trapasigas nin sinsekve de la potarto al la bronzo-aŭ ostolaboristo kaj igas nin malkovri la plej korusaĵon elvokon pri la ĉiutaga vivmaniero de la ferepoka enloĝanto en nia regiono.

Tiel ni vidas ekaperi la unuajn komercistojn el Minorazio aŭ el Etruskio, alportantajn diversajn kaj glazuritajn kalikojn al neevoluintaj gentoj, kiuj ankoraŭ manprioris maldelikatan potaĵon.

Ni kliniĝas super tiuj iberaj nomoj, kiujn la Enserune'anoj tranĉilpinte grifelis sur sian luksan vazaron kaj kiuj eble iam liveros al ni la radikojn de la antikvaj lokaj antroponimoj.

Ni ekscias ke la infanoj, kiuj kuris tra la stratoj kaj proksime al la remparoj de Enserune sciis, kiel la nuntempaj, ludi per pupo, per turbo, per ludostoj, aŭ fari ian naŭvan desegnon sur potrompaĵo.

Ni malkovras la virinan vivmanieron en ŝia hejmo. Dum la infanoj amuziĝas, ŝi muelas la grenon, ŝpinas, teksas, kudras. Ĉi ornamas sian hararon per bronzaĵoj aŭ ostaj pingloj. Ŝi uzas vizagfarbojn kaj parfumojn.

Ni scias ke la viro ĉasas kaj uzas por fiŝkaptado fiŝhokojn similajn al la niaj. Ni konas liajn atakajn kaj defendajn armilojn militokaze.

Sed, pli alte ŝatata afero, ni enpaŝas en la budojn de manlaboristoj, kiuj estas : unue, la potisto ekprovante iaforte imiti la grekajn vazojn ; la felpreparisto uzante ostajn kombilojn por disigi la lanon el la felo ; la prifera laboristo forĝante najlojn, fosilojn, serpetojn kaj hakilojn. Ni eĉ rekonas kirurgiajn iletojn uzatajn de la kuracisto por flegi malsanulojn.

Se la Enserune'anoj postlasis tiom da signoj pri sia materia aŭ arta vivado, ili ne postlasis multajn pruvojn pri siaj religiaj prizorgoj Fakte, esceptante statuetojn de diino-patrino, muldilkavon por Diana busto kaj Merkuran kapeton, la diaĵaj figuradoj estas maloftaj. Maloftaj ankaŭ estas la hejmaj altaretoj.

Sed tiuj loĝantoj, spite ĉion, estas atentaj loki siajn personojn kaj havaĵojn sub la ĉiela protekto. Certe necesas atribui magian signifon al la koralaj okuloj, kiuj ornamas la fibulojn, al la rondopecoj kaj al tiu belega bronzjuvelo formanta trilobbranĉan krucon kaj ne estas hazarde ja ke preskaŭ ĉiuj « dolium'aj » stampoj konsistas el komuna figuro, la duobla voluto, emblemo pri fortoco kaj fekondeco. La provianto, metita sub tiu signo, estis tiel ŝirmata kontraŭ la malbonaj diaĵoj.

Ĉu tio ne estas kelkaj paĝoj de nia naciistorio, kiun ni malkovras iom post iom en tiu homa aluvio, kiu malrapide superŝutis la kabanfundaĵojn kaj la silojn, la murojn kaj la fajrejojn, la remparojn mem ; kiu ĉion ebenigis, sed en kiu la priserĉado revivigas sesjarcentan pasintecon ankoraŭ misterplenan ?

Laŭ teksto de pastro J. GIRY.
Muzeestro de Enserune.

Esperantigis J. Salasc.
Delegito de U.E.A.

5, rue de la Citadelle
Béziers (Hérault)

(3) Dolium = granda tervazo por enteni vinon.

(4) Masaliota = devenanta el Massilia, antikva nomo de Marsejlo.

(5) Italiotaj = praloĝantoj en Centra Italujo.

(6) Rhodiaj = el insulo Rhodes en la Egea Maro.

EL NEDERLANDO

Regino Wilhelmina de Nederlando mortis

En la frua mateno de la 28a de novembro 1962 mortis korpe en sia bela blanka kastelo meze de la pinarbaro la eksa regino de Nederlando, Wilhelmina, **en la alta aĝo de 82 jaroj**. Kun ŝi forpasis, virino, kies laboro kaj agado signis tutan epokon en la historio nederlanda.

Vokita al la trono jam kiel infano dekjara en 1890, ŝi akceptis la kronon en 1898 kaj abdikis ne pli frue ol en 1948 post kvindekjara regado konstitucia. Post tio ŝi retiris sin en sia somera restadejo, la blanka kastelo apud Apeldoorn, sed ne por nur vegeti kiel maljuna pensiomitino. Ne, ekde sia abdiko ŝi fervore eklaboris por sia persona idealo : la interfratiĝo de la popoloj sur bazo de la religio, la kredo en la amo de kaj al Jezuo Kristo.

Dum sia tuta vivo ŝi estis pia, sed vastkompreneza ortodoks-protestanta religiano, sed nur post sia liberiĝo de la reĝinaj devoj ŝi povis pli aktive kaj pli libere agi por tiu sia idealo : la vivo surtera povus esti multe pli bona kaj bela, se ĉiuj homoj komprenus unu la alian sur bazo de komuna Dikredo.

Ŝi verkis aŭtobiografion kun la multsignifa titolo : « Soleca sed ne sola », per kiu ŝi deziras esprimi, ke . . . kvankam ŝi vivis absolute soleca en sia tre alta elstara socia pozicio — ŝi neniam sentis sin sola, ĉar ŝi sciis apud si la Patron de la homaro : sian Dion kaj Kristo estis ŝia ĉiama gvidanto.

El tiu aŭtobiografio, la plej kortuŝa libro, kiun iam mi legis, la nederlandanoj lernis kaj komprenis multe : la virino, kiun ni ĉiuj vidis envolvita en ceremoniaj kaj protokolaj devo kaj kutimoj havis varman homaman koron. Ankaŭ ŝi simpatiegis al simpatio vere homa, ankaŭ ŝin naŭzis la eterna flatado, kiu ĉirkaŭas ĉiun altranĝulon. Kune kun sia edzo, la bonkora princo Henriko, ŝi daŭre provis forkuri el la « ora kaĝo », kiu konstante tenis ŝin kiel kaptiton. Se ni ne jam sciis tion, ni komprenis dum la legado la teruran veron de la proverbo : « ne ĉio kio brilas estas oro ». Jen vivis virino sur alta posteno, kiu povis havi ĉion materialan, kion la mondo prezantas, sed ŝi estis soleca homo.

Imagu la kompatindan infanon dekjaran, tute volvitane en la protokolaj devoj kaj ceremonioj de Kortumo en la lasta jardeko de la 19a jarcento ! Por tiu knabino ne estis samaĝaj kaj egalrajtaj kunludantoj, por ŝi ĉiam « tio devas », « tio ne decas ».

Dum sia restado en Anglujo en la jaroj de la germana okupado (1940-1945) Wilhelmina estis senlaca animanto de la subtera, rezistada movado; kiun ŝi daŭre instigis per siaj radioparoladoj el Londono.

Sed, kiel jam dirite, por ŝi komenciĝis la vera vivo, kiam ŝi, 68 jara, povis demeti la kronon kaj retiri sin el la publika, ceremonia vivo.

« Ĉu restis al mi tasko ? » ŝi titolumis la lastan ĉapitron de sia aŭtobiografio kaj tiun demandon ŝi jese respondas, kiam ŝi skizas sian novan, propravole akceptitan taskon : pli intimiĝi la popolojn al Dio, rekonduki la homaron al Kristo. Ŝi skribis, ke ŝi bezonis longan tempon post la abdiko antaŭ ol ŝi akiris la internan trankvilon, sed subite ŝi certigis, ke Dio difinis ankoraŭ taskon por ŝi. Ŝi sentis sin tuŝata de tia amo al la tuta homaro, kia fluas el Kristo mem. Tuj post tiu revelacio Wilhelmina komprenis la devon kunlabori per sia modesta forto. « Konduki ĉiujn homojn de ĉiuj popoloj aŭ rasoj al Kristo » fariĝis la granda lasta strebado de Wilhelmina, mondĉivitano laŭ propra konvinko, grandega tasko, komisiita al ŝi rekte de Dio mem.

Estas klarigeble, se vi, leganto, same kiel mi ne estas kristana religiano, ke tiu ĉapitro el la vivhistorio de Wilhelmina ne estas tute akceptebla, eĉ estas kaj restas iom mistika. Tamen, mi ŝatus doni la libron en ĉies manoj, precipe en tiuj de la Esperantistoj, ĉar ankaŭ Wilhelmina estis en sia maniero **pledanto por pli bona mondo**, por pli bona mondo en kiu regas paco, paco por ĉiu homo de bona volo.

La libro de Wilhelmina estas jam tradukita en plurajn lingvojn. Eble ni tenos iam en la mano ankaŭ la Esperantan eldonon.

M. de WAARD.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO

Kiam vi legos ĉi-tiun gazeton, jam la gajnintoj de nia konkurso 62-63 estos sciigataj pri sia sukceso. Mi gratulas la du gajnintojn, kaj dankas al ĉiuj partoprenintoj, precipe al tiuj, kiuj, sendante siajn respondojn, skribas kelkajn liniojn, eĉ kiam (mi pli bone skribus : precipe kiam) ili kritikas la konkurso. Ĉar mi ricevis ne nur gratulojn, sed ankaŭ kritikojn, ĉiam afablajn kaj tute ĝustajn. Kelkaj gekonkursintoj dezirus, ke la konkurso entenu nur gramatikajn problemojn, do ne plu kruĉvortenigmojn nek vortĉenojn, ktp. Sed mi devas rimarkigi al ĉiuj ke, eĉ en gramatikaj problemoj devas resti hazarda parto, ĉar nur unu solvon mi povas akcepti, tiun kiu estas konforma al la originala teksto, eĉ se aliaj proponitaj solvoj estas tute korektaj laŭgramatike. Pro tio mi klopodas trovi tekstojn nur el verkistoj univernale akceptitaj kiel bonegaj esperantistoj.

Kun plezuro mi ricevos rimarkojn, kritikojn pri nia konkurso. Tiel mi klopodos, ke, venontan jaron, ĝi estu pli interesa kaj pli konforma al la deziro de la konkursintoj, kies nombron mi esperas ĉiam pli granda.

P. CHEVALIER

19, bd Gabriel-Lauriol

Nantes (L.-A.) - Francujo

BONAN VOJAĜON

Martha versaĵne trovos komplezeman ŝoforon. Sed ĉu ankaŭ la familianoj? Ili devos esti paciencaj. Ankaŭ vi estu paciencaj por trovi la ok diferencojn inter la du ilustraĵoj.



AMUZAJ PROBLEMOJ :

Solve de la lasta problemoj :

LA DIVIDO

Aritmetika solvo.

Se ni formetas 13 el la sumo $218 - 13 = 205$.

Tiuci nombro estas kvinobla malgranda nombro.

La dividanto $205 : 5 = 41$.

La dividato $218 - 41 = 177$

Kontrolo	177	41
	13	4

Algebra solvo.

Estu « x » la dividanta nombro (malgranda nombro). La dividata (granda nombro) estas 218 x

Oni povas skribi

$218 - x = x \times 4 + 13$

$218 - 13 = 4x + x$

$5x = 205$

$x = 41$

$218 - x = 218 - 41 = 177$

Respondo dividanto 41

dividato 177

Nova problemoj (Sro Jarlier)

SESCIFERA NOMBRO

Ni havas sesciferan nombron. La maldekstra cifero estas 2 kaj se oni transportas tiun ciferon de la maldekstro al la dekstro de la nombro, la nova nombro superas la malnovan de 135.308. Kiu estas la unua nombro ?



BONHUMORO



— Panjo ! Johano miksis per la ludas



Lumsignaloj en sportama urbo.



Ili estas tiom bonaj infanoj !
Ili duonigas ĉion !

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
Belujo : F-ino S. Obozinski, avenue Brugmann 364, BRUXELLES 18 (50 fcs).
Britujo : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
Germanujo (Okc.) : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
Germanujo (DDR) : S-ro Ernst Muthschall, 19a) HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).
Hispanujo : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
Italujo : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
 Itala Esperanto-Federacio, Corso G. Galilei, 22, TORINO.
Jugoslavio : S-ro Lehotkay K. Ferenc, ul Petefij eva 27, ZRENJANIN (300 din).
Norvegujo : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
Danlando : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
Pollando : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
Svedujo : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM SÖ, Postgiro : 157007.
Svilando : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).
Usono : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
Aliaj Landoj : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo